

RETKOMUNIKOJ 5/2010

ĈEA-retkomunikoj estas neregula informilo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio sendata al ĉiuj rete atingeblaj membroj de ĈEA kaj ankaŭ al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri la Esperanto-movado en Ĉeĥio. Ĝi neniam enhavas aldonajojn. Se vi tamen ne volas ricevi ilin, sufiĉas respondi per simpla "ne sendadu" kaj ni tuj eligos vin de la dissendolisto.

Enhavo:

1. UNIVERSALA KONGRESO 2011 EN KOPENHAGO
2. DELEGITA RETO DE UEA
3. BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA
4. FLUGKARAVANO AL ĈINIO NULIGITA
5. ESPERANTO-EKSPozICIO EN ČESKÉ BUDĚJOVICE
6. AnkRo – ANTAŬKRISTNASKA RENKONTIĜO EN PÍSEK
7. TRADICIA ESPERANTO-BALO EN ČESKÁ TŘEBOVÁ
8. KRISTNASKAJ NOVAĴOJ EN LA ĈEA-RETEJO PREPARATAS
9. ĈEĤA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS
10. ESPERANTO-KALENDARO 2011

1. UNIVERSALA KONGRESO 2011 EN KOPENHAGO

La 96-a Universala Kongreso (UK) okazos en Kopenhago de la 23-a ĝis 30-a julio 2011.

Ĝia temo rilatos al la internacia Jaro de la Junularo, kun la temo "Dialogo kaj reciproka Kompreno".

Al la UK ĉi-foje ne veturos bus-karavano el Ĉeĥio, do ĉiu interesiĝanto devas mem prizorgi aliĝon, vojon, loĝadon ktp. Ĉeĥa Esperanto Asocio peras kongresan kotizon kaj kaze ke vi sentas bezonon de la helpo kun la aliĝo, bv. turni vin al la ĉefdelegitino LucieKaresova@seznam.cz, tel. 603 444 828.

Pli da informoj vi trovos sur <http://www.esperanto.cz/eo/aktuality/ne-forgesu-ustatempe-ali-i-a-uko.html> kie troviĝas ne nur la aliĝilo, sed ankaŭ necesaj organizaj informoj, turismaj informoj, statistiko pri jam aliĝintaj esperantistoj, ktp.

Vi povas pagi vian kongreskotizon al la konto de ĈEA: 195 230 825/0300, varia simbolo: 06944. Ne forgesu informi L. Karešová pri via pago!

Atentu: Indas aliĝi ĝis la fino de decembro !! (vi tiel pagos en la unua periodo en kiu la alteco de la kongreskotizo avantaĝas) kaj esti la individua membro de UEA!!!

Kaze de pago pere de ĈEA bv. aliĝi kaj pagi la kotizon al la konto de ĈEA antaŭ la 23-a de decembro, ke ĝi povu esti traktata ĝis la fino de 2010.

Pli da informoj rilate al la UK, aliĝilo kaj individua membreco de UEA vi povas ricevi ĉe

LucieKaresova@seznam.cz, tel. 603 444 828.

2. DELEGITA RETO DE UEA

Delegita reto estas reto de esperantistoj – individuaj membroj de UEA, listigita en Jarlibro laŭ landoj kaj urboj. Ĉiu el vi, kiuj estas individuaj membroj de UEA, povas fariĝi delegito kaj tiel oferti iom da via libera tempo kaj energio al aliaj esperantistoj – individuaj membroj.

Individuaj membroj de UEA povas konsulti la liston de la Delegita Reto ankaŭ per Interreto.

La „Reta Jarlibro“ prezentas la samajn informojn kiel la papera, kun grava diferenco, ke en la reta versio ili estas ĉiutage automate aktualigataj, danke al rekta ligo kun la komputiloj de la Centra Oficejo. Necesas tamen esti individua membro de UEA por eniri kaj por la unua vizito vi devas registriĝi. Dum la registrado oni indiku sian UEA-kodon kaj retadreson konatan al UEA. Plej facilas per la ligilo nomata „Jarlibro“ el la starta paĝo de la UEA-retejo: www.uea.org.

Ĉiuj individuaj membroj de UEA rajtas peti informojn pri turismo, diversaj realaĵoj, instruado, Esperanto-movado, ktp. de la delegitoj. La delegitoj povas rekomendi hotelon, traduki mallongan leteron, au simile, sed ankaŭ rajtas rifuzi la servon, se ĝia plenumo postulus multan labortempon, specialajn konojn, aŭ se ĝi postulus viajn elspezojn.

Praktike, ne venas multaj demandoj. Samtempe denso de delegita reto ofertas „bildon“ pri esperanto-movado de koncerna lando.

Tial, se vi ne timas oferti vian nomon kaj iom da energio por plidensigi delegitan reton en Ĉeĥio kaj se vi estas individua membro, bonvolu aliĝi kiel delegito.

Informiĝu ĉe la supre menciitaj kontaktabloj ĉe la ĉefdelegitino Lucie Karešová

3. BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA

La gvida Esperanta artkonkurso, la Belartaj Konkursoj de UEA, invitas partoprenantojn por la 62a fojo. La rezultojn oni anoncos en la 96a Universala Kongreso en Kopenhago. Partopreno estas libera al ĉiuj kaj ne ligita al partopreno en la U.K., nek al membreco en UEA. La konkursaĵoj devas esti neniam antaŭe publikigitaj en ajna formo, escepte de la branĉoj : infanlibroj, kanto, filmo. Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo. Pli da informoj kaj kondiĉojn de la partopreno la interesigantoj trovos ĉe www.uea.org/dokumentoj/komunikoj/gk.php?no=399#1

4. FLUGKARAVANO AL ĈINIO NULIGITA

Ĉar la minimuma nombro por ke la anoncita flugkaravano al Ĉinio ligo al Internacia Esperanto-konferenco en Wuhan estis 12 kaj aliĝis nur 9 interesatoj, ĝi devis esti nuligita. Do atentu, ke la plej proksima flugkaravano al Azio okazos nur en 2012 al Vjetnamio ligo al la 97-a UK en Hanojo.

5. ESPERANTO-EKSPOZICIO EN ĈESKÉ BUDĚJOVICE

Migra ekspozicio "Ĉu esperanto estas morta lingvo?" estos videbla 1.-28.2. en Sudbohemia scienca biblioteko en České Budějovice (<http://www.cbvk.cz>) , Lidická str. 1 (teretaĝo en salono kun elektronikaj katalogoj). Eniro libera! 28.2. ekde 16h okazos en tiea prelegsalono programo pri Esperanto por publiko. Esperantistoj kaj iliaj gastoj bonvenas!

Antaŭdankon por diskonigo de la informo. Fotogalerio de la ekspozicio:
http://esperanto1.rajce.idnes.cz/Putovni_vystava_Je_esperanto_mrtvy_jazyk/

Info: pisek@esperanto.cz

6. AnkRo – ANTAŬKRISTNASKA RENKONTIĜO EN PÍSEK

okazos la 11-an de decembro 2010

* Antaŭtagmeze Kultura matineo en la Urba biblioteko (kiu informas pri si ankaŭ E-lingve en sia retpaĝaro www.knih-pi.cz. – klaku al „Esperanto“ supre maldekstre) - okaze de Tago de Esperanto-libro kaj adventa enpenŝigo kaj diskuto kun d-ro Max Kašparů

* Adventa programo en urbe kaj solena posttagmezo en spirito de popolaj kaj kristanaj kristnaskaj tradicioj

Info: <http://www.esperanto.cz/eo/akce/ankro-anta-kristnaska-renkonti-o-254.html>

aŭ pisek@esperanto.cz

7. TRADICIA ESPERANTO-BALO EN ČESKÁ TŘEBOVÁ

De la 29-a ĝis 30-a de decembro 2010. Ĉi-jara temo – „Talentmanio“. Por havi certecon pri sidloko kaj manĝo, necesas aliĝi kaj antaŭpagi laŭeble ĝis la 1-a de decembro!

Info: <http://www.esperanto.cz/cs/akce/tradicni-esperantsky-silvestr-346.html>

aŭ jk.esperanto@seznam.cz

8. KRISTNASKAJ NOVAĴOJ EN LA ĈEA-RETEJO PREPARATAS

Ekde la 2-a de decembro ne maltrafu viziti www.esperanto.cz la rubrikon Aktuality, kie aperos la 4-a numero de la vikirevuo MOZAIKO, ĉi-foje parte en adventa/kristnaska mantelo.

Pli poste sekvos ankaŭ aparta artikolo kun ligiloj al interesaj E-artikoloj / kantoj / videofilmetoj kun kristnaska kaj zamenhofa temoj kaj ankaŭ nove kompilita kantareto de kristnaskaj kantoj en Esperanto!

9. ĈEĤA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS

(oficiala organo de ĈEJ redaktata de Marek Blahuš)

Ĉeĥa Esperanto-Junularo (ĈEJ) kunvenis 20-ope dum la semajnfino de la 12-a ĝis la 14-a de novembro en Žirovnice, asistata de Max KAŠPARŮ, sia nova honora membro. Sabate dum ĝenerala asembleo

elektiĝis nova estraro. Kvar komitatanoj konservis siajn funkciojn: Daniel MRÁZEK kiel prezidanto, Marek BLAHUŠ vicprezidanto, Dagmar CHVÁTALOVÁ kasisto kaj Barbora ZÁVODSKÁ ordinara membro. Al ili aliĝis Vít Guglielmo MIŠUREC, anstataŭ Miroslav HRUŠKA, kiu transiris en la revizian komisionon. Tie krom li membras Karol RYDLO kaj prezidanto Tomáš BŘICHÁČEK. La nova estraro dankas al eksiginta Petr Adam DOHNÁLEK pro lia kunlaboro.

Pri ĈEJ kaj ĝia renkontiĝo raportis la 15-an de novembro regiona gazeto "Pelhřimovský deník", per du artikoloj kun grandaj fotoj sur la dua paĝo kaj atentigo sur la unua paĝo. La artikoloj kaj fotoj troveblas rete: "Žirovnickým pastoračním střediskem znělo esperanto" ("Tra la pasterala centrejo en Žirovnice sonis esperanto") ĉe

http://pelhrimovsky.denik.cz/zpravy_region/20101114pe_esperanto.html kaj "Esperanto nezná věkové hranice" ("Esperanto ne konas aĝlimojn") ĉe

http://pelhrimovsky.denik.cz/zpravy_region/20101114pe_storka.html

Jam la 24-an de septembro Petr CHRDLÉ kun Michal SEDLÁK prezentis esperanton al trideko da gimnazianoj en Prago-Modřany okaze de la Eŭropa tago de lingvoj. La 23-an de oktobro Daniel MRÁZEK renkontiĝis kun esperantisto en Tesaloniko (Grekio). Marek BLAHUŠ nomumiĝis komitatano A de TEJO ĉe UEA, jam oktobre ĉeestis transdonon de la FAME-premio en Aalen (Germanio), komence de novembro organizis trilandan junularan renkontiĝon en Bazelo (Svislando), kaj la 24-an de novembro vizitis Brnon kaj prelegis tie pri Kubo. La Konferencon pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST) organizitan de E@I en Modra (Slovakio) ĉeestis 7 ĈEJ-anoj, semajnon poste 2 ĉeestis la konferencon de la Societo por interlingvistiko en Berlino. En la revuo Kontakto 2010:4 (238) kun temo "Katastrofoj" aperis artikolo de Miroslav HRUŠKA pri "La Ĉernobila katastrofo". Retpaĝaro de ĈEJ troviĝas ĉe <http://cej.esperanto.cz/>

10. ESPERANTO-KALENDARO 2011

La lastajn ĉi-jarajn ĈEA-retkomunikojn ni planas dissendi okaze de kristnaskaj kaj jarŝanĝaj festotagoj kaj en ĝi devus esti laŭeble kompleta kalendaro de Esperanto-aranĝoj en Ĉeĥio en 2011. La organizantoj do ne forgesu sendi koncizan informon, kiu enhavu la nomon de la aranĝo, la datojn, loko kaj la retan kontaktadreson al chrdle@kava-pech.cz. Komprenu, ke ni ne povos envicigi en la kalendaron eventojn, pri kiuj ni ne scias!

Atentu, ke la plej kompletan kalendaron de Esperanto-eventoj en la tuta mondo, sed ankaŭ plurajn utilajn informojn, vi trovos daŭre ĉe www.eventoj.hu